

Numero: 238.
Marto: 2012.

19-a jarkolekto

LITERATURA FOLIO

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefono: 82/ 410-664
Retadreso: espBELA@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Printempa venteto



La noktoj ankoraŭ estas frostaj, sed jam tage varmete sunas, kaj sur la branĉoj de la arboj birdetoj pepadadas salutante la printempon.

Mi staras sur kampo, kie ankoraŭ antaŭ longe neĝo kaj glacio kovris la pejzaĝon. Apenaŭ pasis la vintro, sed mi jam sentas la odoron de la proksimiĝanta printempo.

La surfaco ankoraŭ dormetas, sed mi scias, post kelkaj semajnoj tie ĉi abundos la vivo. Ĉio verdos kaj floros, ili ĉarmos min.

Kiel milionoj da homoj mi ŝategas la printempon.

Stari sur flora kampo kaj enspiri la freŝan aeron estas grandioze. Mian vizaĝon ekkaresas milda venteto. Ĝi movigas mian korpon.

Venu amiko kaj ni kune ĝuu ĉi belegan sezonon!

Por mi la printempo estas la renoviĝo, kiam la naturo plibeliĝas.

Kiom bonege promeni en la duondormanta arbaro, kie jam ekvekiĝas la arboj kaj arbustoj.

Multloke la birdetoj ektrilas kaj mire ili krias al ni:

--Homo, defendu la arbaron, la lastan ŝirmejon en tiu ĉi kruela mondo, kie ĉio estas maŝineca kaj homo forgesiĝas pri sia frato.

Rigardu la bestojn de la arbaro. Ili vivas en ĉiela harmonio. Ilian trankvilon ĝenas nur ni, homoj, per brulaj aŭtoj, motorcikloj tien – reen traveturante la arbaron.

Printempe ni denove vizitos la naturon. Mi petas vin, kara leganto, lasu hejme viajn maŝinojn kaj silente kaj perpiede enpaŝu ĉi sanktejon. Estimiu la bestojn kaj plantojn de la arbaroj kaj kamparoj, ĉar ankaŭ vi estas ilia parto.

Pri tio neniam forgesiĝu! Alvenos la tempo, kiam vi denove devos reiri al tiu ĉi ŝirmejo. La mondo eterne ŝanĝiĝos.

Nun vi estas la mastro, sed eble morgaŭ super vi trakuros printempa venteto alportanta novan ideon, kiu transformos vian bildon pri la mondo. Eble ĝi falos en malhelan abismon, poste ĉio komenciĝos denove.

Estas printempo kaj mia koro pleniĝas kun espero. Mi atendas la karesantan venteton kaj mi etendas miajn manojn al la ĉielo.

-Redaktanto-

Du anseroj

En la birdokorto sub alta prunarbo du anseroj babilis.

Komence la temo estis ĝenerala pri la ĉiutaga vivo, pli precize, kion ili ricevos je vespermanĝo.

La problemo tiam komenciĝis, kiam iu ansero fanfaronis, ke ĝi lernas fremdan lingvon.

--Kiun lingvon vi lernas? – demandis la alia scivole.

--Antaŭ nelonge mi komencis lerni la lingvon de la anasoj.

--Ĉu? Kial ĝuste ĉi lingvon? Laŭ mi estus pli utile ellerni la lingvon de vulpo, kiu ĉasiras ĉiunokte ĉi tie. Se vi scias ĝian lingvon, tiam vi povus komprenigi vin kun la vulpo, se hazarde ĝi envenas la anserejon.

--Ĉu laŭ vi tiu lingvo estas pli utila, ol la anasa?

--Jes kompreneble. Mi proponas al vi, ĉesu la lernadon de la anasolingvo! Anstataŭe ni lernu la lingvon de la vulpo!

--Eble vi pravas. La vulpolingvo estas pli utila. Sed kiel lerni ĝin?

--Facile. Morgaŭ ni kaŝobservos la vulpon, kiam ĝi estos ĉe la barilo kaj mi petos, ke ĝi instru al ni la lingvon. Espereble ĝi estos bonega instruisto kaj per ĝia helpo ni rapide ellernos la vulpolingvon.

Alitage ili iris al la malantaŭa barilo, kaj atendis la vulpon. Jam vesperiĝis kaj ĝuste ili deziris reiri al la birdokorto, kiam ekaperis la ruzulo.

Ili ĝojege mansignadis al ĝi.

--Sinjoro vulpo! Sinjoro vulpo! Ni deziras paroli kun vi.

--Pri kio vi volas paroli kun mi? – demandis scivole la vulpo.

Ili detale rakontis pri sia plano, kaj petis ĝin instrui la vulpolingvon.

La okuloj de la vulpo ekbrilis, kaj ĝi tuj diris al la anseroj.

--Karaĵ, tre volonte. Se vi deziras, ni povas komenci tuj la lernadon.

--Kompreneble – ĝojegis la du amikinoj – ni ekkomencu tuj.

--Vi havas bonŝancon – ruzetis la vulpo – mi ĝuste kunportis mian lingvolernejon. Bonvolu eniĝi en ĉi sakon, kie estas lingvolernejo.

La anseroj obeis kaj senpense ensakiĝis. Nur tion atendis la vulpo, ĉar kiam ili estis ene, ĝi tuj fermis la sakon kaj forkuris hejmen kun la valoraj ĉasaĵoj.

-Ŝaŝa-

Lasta letero

La maljunulo sidis amare ĉe la skribotablo kaj mute li rigardis antaŭ si la blankan folion. Li estis tre malĝoja kaj ne sciis, kion skribi. Jam delonge li ne korespondis, kvankam junaĝe li ciutage skribis du aŭ tri leterojn.

Li ŝatis korespondi. La korespondado malfermis antaŭ li la mondon. Sed nuntempe ĉi emo forflugis. La ĉarmo de la koverto malaperis. Li ne komprenis la kaŭzon.

Eble la mondo ŝanĝiĝis. Ĝi tre ŝanĝiĝis.

Antaŭe li feliĉe skribis leteron. Lin plezurigis, kiam la blanka papero pleniĝis kun nigraj literoj el kiu transformiĝis vortoj kaj frazoj.

Nun la skribo estis malfacila. Ne kreskis la teksto, kiel antaŭe.

Junaĝe tio ne estis problemo. Li facile trovis en sia kapo la vortojn.



Skribi leteron antaŭ jaroj estis ĝuo. Enmeti ĝin en koverton, iri al la poŝtoŭicejo, aĉeti poŝtmarkon, surglui ĝin kaj fine sendi al la adresito.

Ĝi estis kvazaŭ festa ceremonio. Post ĉiu letero li sentis plifaciliĝon. Lia koro kaj animo flugis alten super la ĉielojn.

Sed sendi leteron per fulmopoŝto estas ĉiutaga. Oni sentas nenion ene profunde, kie pulsas la koro.

Unu klicko kaj jam la letero aŭ mesaĝo flugas tra la mondo.

Alifoje li devis atendi tagojn ofte semajnojn por la respondo. Nun se vi havas bonŝancon post kelkaj minutoj alvenos la respondo.

Oni povus ĝojegi, ja tio estas grandioza.

Tamen nun sidante super la banka papero li sentis nostalgion. Kvankam antaŭ multaj jaroj li kiam malpacience atendis la respondon. Ĉiutage matene kuris al la leterkesto por rigardi ĝian enhavon.



Tiam ankoraŭ la mondo estis malrapida kaj eble pli trankvila.

Li ne ŝatis la nunan vivon. Ĉio tre plirapidiĝis kaj plastiĝis. Laŭ li ankaŭ la homo mem. Jam nenio estas natura.

El plastiko estas la tuta universo, ankaŭ la homa koro.

Tio estas terura. – Li ne volis tian mondon. Antaŭ jardekoj la vivo estis rozkolora kaj alloga.

Li maljuniĝis. Super lia kapo forflugis la tempo kaj jam neniam revenas la juneco.

Estus bone kredi, ke ĝi estas iluzio kaj homo neniam iĝas maljuna.

Dudekjare li ĉiam kredis, ke ĉi stato daŭros por ĉiam. Neniam alvenos la nokto.

Tiam li nur ridis, se oni atentigis lin pri la paso de la tempo.

Nun ĉi blanka papero, enmane plumo krias avarte: Atentu! Ĉio ŝanĝiĝas. En iu tago ankaŭ vi estos nur memoro. Eble iu rememoras ankaŭ pri vi.



Kion skribi? La temo elĉerpiĝis.

Ĉu skribi leteron al knabino? Kial? La knabinoj ne deziras korespondi jam kun li.

Ili revas pri aliuloj. Pri junuloj. Ili ne atendas koverton portata per leterportisto. La nunaj knabinoj sidas antaŭ la portebla komputilo kaj retumas. Dum la retumado ili babilas skribe aŭ skajpas.

Jes ĝi estas jam moderna mondo. Ĝi ne estas la lia.

Tio ĉi ege malgajigis la maljunulon. Malgranda larmoguto elrulis el siaj lacaj okuloj kaj ĝi falis sur la blankan paperon, kiu estis ankoraŭ malplena. La blankeco de la papero preskaŭ blindigis lin.

Kiam li estis dudekjara la letero estis skribita dum dek minutoj.

Li ne komprenis, kial li ne povas skribi simplan leteron. Ankaŭ lia kapo malpleniĝis, kvazaŭ tie estus nenio.

Kien malaperis la ideoj kaj bonegaj pensoj? Ĉu la kapo de ankaŭ aliaj homoj malpleniĝis. Se jes, tiam la homaro estas akvokapa.

Kiel liberiĝi el tiu ĉi stato? – Li ne sciis. Li estis senkonsila kaj tre malĝoja.

Li nur rigardis la blankan paperon. Foje – foje li ekprovis surpaperigi kelke da vortoj, sed la plumo ne obeis. Ĝi ne skribis la ĝustajn vortojn.

Ankaŭ lia mano tremis. La literoj estis nelegeblaj. Kiu povos legi liajn literojn kaj vortojn? Ĉu iun interesos, kion li skribos?

Eble vane estos skribita ĉiu vorto kaj la leteron oni enĵetos paperkorbon. Por malhelpi tiun ĉi ĝenan situacion li mem ĉifis ĝin kaj enuiĝante flankenŝovis ĝin.

-Apáti Kovács Béla-

Poezio

Endre Ady estas poeto kun potence tragedia forto kun ekstrema streĉiteco, forta, kuraĝa, kvazaŭ nova lingvouzo. Lia liriko estas unueca, simbola konstruaĵo, en kiu Dio, Amo kaj la Socio estas la bazoj de serĉado, sopiroj kaj ribeleco. Pasintjare oni festis en Hungarlando la 80-jaran datrevenon de lia naskiĝo. En kontakto kun tio la Hungara Scienca Akademio sendis alvokon pri kolekto de informoj. Ni aperigas la alvokon ĉe alia loko de la gazeto.

La morto de la ĉielarko de Endre ADY elhungarigis Kálmán KALOCSAY

Neiam ĉielark' pli brila
ĉielon ringe ĉirkaŭprenis,
neniam tiel vasta ark',
tiel brakuma, sankta ring',
sed jen, jam vespero venis.

Rigardi gapi jam enuis
kampuloj, birdoj, brut' kampara,
okuloj, pugnoj hontis jam,
ke jen moliĝis ili nun
pro nura ĉielark' vulgara.

La Sun' maljuna dum subiro
okulis moke je l' spektaklo.
Ĝin plaĉis ja, ke vekas nun
sur tiu sopra, sterka kamp'
admiron ĉi kolormiraklo.

La ĉielark' ankoraŭ brilis,
ĝi eĉ beliĝis dum ekpalo,
rigardis plore al la kamp'.
Kolorojn ĝiajn sanktajn nun
eksorbis fine nubvualo.

La Sun' maljuna ride dronis,
ekspiris malpeziĝe ĉio.
Ne estas por la ŝvita kamp'
tia majesta, sankta kaj
freneza ĉiel-komedio.

Poezio

Al amikino de l' iluzioj de Julio BAGHY

DIT, migras vi reve en bosko de bardoj,
pompo de buntaj kantfloroj vin ravas.
Dum febre vi vokas aŭronon en ardoj,
por vi parulon el ombroj vi havas
kaj ... dormas. Nur ŝajnas la viglo de l' koro;
am' de mortintaj amantoj vin ĉenas.
Sur voj' de revado vagante en solo
tiel vin trovi nur vane vi penas.

Torditan realon prezentas imago:
ŝminkas nur ritmo kaj rimoj ĝin bela,
mensoga promeso anstataŭ la ago,
ploro aŭ rido ja restas -- sencela.
Nektaron vi sorbas kaj tamen soifas,
vidas eĉ sunon sen bril' tra nebulo,
burĝonojn de kor' via velko jam ĉifas;
sorton nur havas, ne vivon, timulo.

DIT, ĉasta obstino mallertas eĉ vivi.
Teren el bosko de rev' mi vin pelas,
ke sentu vi vin mem volanta aktivi;
sciu: vi amas, vin am' mia celas.
Ne gravas la daŭro de sent' emocia,
kiam nin lulas amsorĉa arpeĝo;
je paro kunforĝas nin amo pasia,
estras nun en ni -- la Vivo kaj Leĝo.



Por infanoj



Katido kaj la hundo

Avino havis katidon. Ĝi estis petolema besto. La maljunulino ĉiutage donis al ĝi freŝan lakton.

--Venu mia kara katido! Jen estas la bongusta lakto. Ĉiu kato ŝatas tiun ĉi trinkaĵon – diris avino al la malgranda besto kaj ŝi verŝis en la teleron varmetan lakton.

La kato kontente lekadis ĝin kaj feliĉe ĵetis amikeman rigardon al sia dommastrino, kvazaŭ ĝi estus dirinta:

--Mi dankegas al vi. Vi estas tre bonkora. Se mi fariĝos granda kato, mi kaptos ĉiun muson en la domo.

Tiel ili vivis en granda feliĉo, kiam en iu tago la katido decidis, ke ĝi vizitos la najbaran korton.

La malsaĝeta besto ne sciis, ke tie vivas la timiga hundo, la ĥimero de la katoj. Ĝia famo jam estis



konata en la tuta vilaĝo.

Neniu kato kuraĝis iri proksime al la korto. Ili evitis, eĉ ankaŭ la ĉirkaŭaĵon.

Pri ĝi avino ne rakontis al la katido. Ĝi pensis, ankaŭ en la najbaro vivas amikemaj bestoj kun kiuj ĝi povos ludi.

Do, ĝi ekiris malkovri la mondon. Facile li iris trans la lignobarilon kaj ĝi trovis sin en la korto de la najbaro.

En la unua momento ĉio estis en ordo. Granda silento akceptis ĝin.

La timiga hundo pace dormis en sia domo nesuspektante, ke gasto alvenis.

La katido promenadis sur la granda korto kaj rigardadis la iom fore estantajn kortobirdojn. Ankaŭ la avino havis tiajn bestojn. Ofte la koko pikis ĝian nazon, kiam ĝi iris tro proksime al la kortobirdoj. Tial li rapide ellernis fore eviti tiujn ĉi pulmajn bestojn.



Ankaŭ nun ĝi ne kuraĝis iri proksime al ili. Anstataŭ tio ĝian interesiĝon vekis malgranda dometo sub la alta juglandarbo.

„Kio ĝi estas?” – cerbumis la katido – „Kiom interesa konstruaĵo. Ĉe avino ne estas tia dometo. Estus bone loĝi en ĝi. Ĝi petos la avinon por ke ankaŭ ŝi konstruigu tian dometon en la korto kaj ĝi loĝos tie, kiel reĝo.”

Tiel ĝi revadis ĝis atingis la dometon. La katido proksimiĝis de ĝia malantaŭo al la enirejo.

De tie la hundo ne estis videbla. Certe ĝi pensis, ke la domo estas malplena kaj tie ĝi povos ekripi.

Kiel katido ludeme volis enkuri la dometon, ne sciis kia surpizo estos tie.

Ankaŭ la hundo surpriziĝis, kiam neatendite antaŭ ĝi ekaperis malgranda kato.

Ili ambaŭ mire rigardis unu la alian.

Unue la timiga hundo rekonsciiĝis kaj kolere me ekbojis montrante sian dentaron.

La katido ankoraŭ ne vidis veran hundon. Se la avino rakontis pri ĝi, tiam la malgranda kato pensis, ke ĝi estas nur en fabelo.

La katido provis rideti al la hundo, kiu denove montris al ĝi siajn akrajn dentojn kaj timige ekmurmuris. Kvazaŭ ĝi estus dirinta:

--Malaperu, ĉar mi tuj disŝiros vin! Ĉu vi ne vidas miajn akrajn dentojn? Ankaŭ hieraŭ mi manĝis katon. Nun vi sekvos.

La najbara gasto ne atendis tian akcepton, sed eble ĝi sentis la danĝeron, ĉar sur ĝia dorso la haroj ekstaris kaj la katido montris defendpozon. Ĝi komencis retrotiriĝi el la domo.

En la lasta momento ĝi sukcesis forkuri. Sed la timiga hundo kuregis tuj post ĝin. Ŝajnis, ke ĝi deziras kapti la etan beston, kiu venis por viziti la najbaron.

Dum kelkaj minutoj la katido povis kuri tien kaj reen en la korto. Fine ĝia forto elĉerpiĝis kaj ankoraŭ unu aŭ du paŝoj kaj la timiga hundo atingos ĝin.

Bonŝance la najbaro venis el la domo kaj li ekvidis la neegalan lukton.

--Cezaro! – li ekkriis laŭte – Venu al mi! Lasu la najbaran katidon.

La hundo haltis kaj malgaje rigardis al sia mastro.

--Mastro mia mi jam preskaŭ kaptis ĝin.

Tiel saviĝis la katido, kiu plurfoje ne kuraĝis iri al la najbaro. Ĝi ellernis kiom danĝera estas la najbara hundo.

-Onklo Adalberto-

URBOJ

Budapeŝto



Varsovio



Vieno



Bratislavo



Prago



Bukareŝto

